

AL: S-ro Masanobu Sugatsuke,
la ĉefredaktoro de la magazino *Esperanto Culture Magazine*,
prezidanto de Gutenberg Orchestra Co.,Ltd.

Pri la lanĉo de la anglalingva magazino *Esperanto Culture Magazine*

Japana Esperanto-Instituto (JEI) salutas vin okaze de la lanĉo de la magazino *Esperanto Culture Magazine*, kiu portas la titolon “esperanto”, saman kiel la nomo de internacia lingvo Esperanto.

JEI kunhavas surprizon, embarason, malkomfortecon kaj dubon, kiujn multaj esperantistoj sentis rilate al la lanĉo de la magazino. Ankaŭ Universala Esperanto-Asocio, kiu havas oficialan interrilaton kun Unuiĝintaj Nacioj kaj UNESKO, serioze interesiĝas pri tiu ĉi afero.

Esperanto, kiu apartenas al neniu nacio nek etna grupo, estas internacia lingvo reale utiligebla kaj aktuale utiligata. JEI aktivadas dum pli ol 100 jaroj por la disvastigo de tiasenca internacia lingvo Esperanto kaj ties kulturo. Tial ni pensas, ke la celo de la magazino, kies tuto estas skribita en la angla lingvo senrilate kun Esperanto, estas esence malsama ol tiu de nia esperanta komunumo.

Esperanto estas la lingvo malfermita al ĉiuj homoj, kaj ke neniu povas alproprigi ĝin ekskluzive al si. Ĉiuj rajtas esprimi sian afablecon al Esperanto eĉ ne scipovante ĝin. Tamen, ni instigas vin denove kompreni, ke la uzo de Esperanto estis kaj estas kerno de la evoluo de la internacia esperanta kulturagado ekde la jaro 1887.

“Esperanto Culture” (Esperanta Kulturo), kiun vi uzas por la nomo de viaj entreprenoj “Esperanto Culture Magazine” kaj “Esperanto Culture Community”, estas ĝenerale rigardata kiel la diversaj kulturoj de tutmonda esperantistaro naskiĝintaj kaj kreskiĝintaj en la supremenciita historio de Esperanto. La uzo de “Esperanto Culture” por tute alia senco povas konfuzigi homojn tra la mondo, pri kio JEI esprimas sian fortan bedaŭron.

Pri la registropeto de la varmarko “エスペラントカルチャーマガジン / ESPERANTO CULTURE MAGAZINE” por gazeto, libro kaj liverado de bitaj eldonajoj fare de via firmao, JEI neniel povis antaŭe scii. “Esperanta kulturmagazino” estas interpretebla kiel la nomo de kategorio, al kiu apartenas multaj gazetoj, revuoj kaj magazinoj ekzistantaj kaj ekzistantaj dum 133 jaroj ekde la apero de Esperanto. Ĉar registrado de tiu varmarko povos efektive malhelpi la ekzistantan Esperanto-movadon, JEI nun detale esploras ties efikojn kun serioza intereso. Helpe de konsiloj de specialistoj de tiu kampo, ni volas havi sinceran interparoladon kun vi pri la afero, por ke viaj agadoj ne damaĝos tutmondan Esperanto-movadon, konsiderante ke JEI ne troe blokos viajn entreprenojn.

Laste, ni petas vin denove klarigi kial vi elektis la titolon de “esperanto” por la magazino, kaj uzas la nomon “Esperanto Culture” por viaj entreprenoj. Estas dankeme se via respondo en dokumenta formo atingos nin antaŭ aŭ ene de la 5a de januaro 2021.

Cetere, konsidere de grava interesiĝo pri la afero el diversaj flankoj en la mondo, ni decidis, ke tiun ĉi leteron ni publikigas sur nia retejo. Kaj se vi konsentas, vian respondon ni publikigos dulingve en Esperanto kaj la japana.

Sincere,

La 27an de decembro, 2020
Kitagawa Ikuko, prezidanto
de Japana Esperanto-Instituto

『Esperanto Culture Magazine』誌編集長、
株式会社グーテンベルクオーケストラ代表取締役
菅付雅信様

英文雑誌『Esperanto Culture Magazine』創刊について

国際語エスペラントと同じ名前の題字「esperanto」を表示した雑誌『Esperanto Culture Magazine』を創刊されたことに際し、一般財団法人日本エスペラント協会よりご挨拶申し上げます。

本会は、貴誌の発行に関して多くのエスペラント使用者が抱いた驚きや戸惑い、居心地の悪さや疑念を共有しています。国際連合およびユネスコと公的な協力関係にある世界エスペラント協会も、この問題に重大な関心を寄せています。

特定の国／民族に属さない言語であるエスペラントは、現実に実用可能な、また現在も実用されている国際語です。本会は、この意味での国際語エスペラントとその文化の普及を目的に、100年以上にわたり活動してまいりました。それゆえ、全編がエスペラントと関係なく英語で書かれた貴誌の目的は、わたしたちエスペラント・コミュニティの目指すものとは本質的に異なるものであると考えます。

エスペラントは、あらゆる人にとって開かれた言語であり、誰もそれを排他的に専有することはできません。エスペラント使用者でなくとも、エスペラント文化への親しみを表現することができます。ですが、1887年以降のエスペラントを用いた国際的な文化活動は、エスペラントの使用を中核として発展し、現在まで続いていることを、あらためてご理解いただきたいと思えます。

貴社が『Esperanto Culture Magazine』や「Esperanto Culture Community」などの事業の名称に使用されている「Esperanto Culture」（エスペラント文化）ですが、これは上記のエスペラントの歴史の中で生まれ育ってきた、世界中のエスペラント使用者による様々な文化のことだと認識されているものです。その「Esperanto Culture」がまったく異なる意味で使用されることは、世界の人々を混乱させるものであり、本会はこれを深く憂慮しています。

また、貴社による、雑誌、書籍および電子出版物の提供に関わる「エスペラントカルチャーマガジン / ESPERANTO CULTURE MAGAZINE」の商標登録出願について、本会は事前に知るすべがありませんでした。「エスペラント文化雑誌」とは、エスペラント発表以来133年間にわたって多数存在した雑誌が属する、ジャンル名を指す言葉であると捉えられます。この商標が登録された場合、既存のエスペラント運動のさまたげになる可能性があるため、本会では現在、強い関心を持ってその影響について精査しています。その分野の専門家の助言を受けながら、貴社の行動が全世界のエスペラント運動に損害を与えないように、また、本会が必要以上に貴社の事業を阻害することのないよう留意し、本件について貴社との率直な対話を持つことを求めたいと思えます。

最後に、「esperanto」を貴誌の題字として選び、事業名に「Esperanto Culture」を用いている理由をあらためてお聞かせください。誠に勝手ながら、2021年1月5日までに書面でご回答いただければ幸いです。

なお、各方面からの強い関心に鑑み、本状は本会ウェブサイトでも公表いたします。また、いただいたご回答は、差し支えなければ、エスペラントと日本語の2言語で公表させていただきたく存じます。

どうぞよろしくお願いたします。

2020年12月27日
一般財団法人日本エスペラント協会
理事長 北川郁子